

2022. 5.23 DR Kongo 民主コンゴ共和国



Kara avo salutojn!

Kiel via fartas ?

Mi ĵus translokiĝis pro la milita okazantaĵo en Ruĉuru, mia distrikto. Nuntempe mi ĵus alvenis al Goma, mia ĉefurbo.

La milito komenciĝis en marto kaj daŭras ĝis nun. Ribelantoj kontraŭ la oficiala armeo. La milito ne ĉesas kaj senkulpaj homoj mortas ĉiun tagon. Mi decidis refuĝi por savi mian

vivon kaj la familion. Nun mi serĉas kiel zorgi pri ĝi, ne havante ekonomian enspezon. Bv daŭrigi preĝi por refuĝintoj el la mondo, aparte por mi.

Samideane, via Elie HAVUGIMANA el GOMA.

親愛なる祖父へ！元気ですか？ 私は最近、私の地区であるルチュルでの戦乱のために避難して、今首都のゴマに到着しました。戦争は3月に始まり、今日まで続いています。政府軍対反政府軍の戦争です。戦争は止まらず、罪のない人々が毎日死んでいます。添付した映像を見てください。

私は自分の命と家族を救うために避難することにしました。今、私は収入がない中で、どうやって家族の面倒を見るか方策を模索中です。難民のために、特に私のために、これからもお祈りください。

Elie HAVUGIMANA el GOMA



VID-20220522-W
A0003.m p4

REÇU N°...009...

MONTANT 150\$

Reçu de: Elie HAVUGIMANA

La somme de Cent cinquante
dollars Américain

En règlement de: Paiement loyer
de six mois du 18 mai
au 18 novembre 18 / 05 / 2022

Signature
Elie 0997748595

Kara afabla Amiko, Saluton!

Mi jam trovis la loĝejon en Goma sed ĝi estas altkosta. Mi aranĝis min kiel pagi 6 monatojn. En Goma la malalta luanthomo estas 25\$ monate. Mi havas kelkajn familianojn sed ne kapablas helpi ilin.

Mi ne ankoraŭ trovis laboron sed serĉas kiel mi povas Vivi en tiu urbo, ĉar ne estas kampo por terkultivado, nur komerco kaj ŝtataj laboroj.

Kara mi sendas al vi la fakturon de la luanthomo.

Altestime, mi bondeziras al vi sanon! Elie HAVUGIMANA el Goma.

親愛なる友人へ、こんにちは！ 私はすでにゴマでアパートを見つけましたが、それは高価です。私は6ヶ月の支払が出来るようにしました。ゴマでは、低い家賃は月25ドルです。私には家族が何人かいますが、彼らを助けることはできません。

私はまだ仕事を見つけていません。農業用の畑はなく、仕事は商業と公務員の仕事しかないので、何とかそのようにして生きる方法を探しています。

私はあなたに賃貸住宅の請求書を送ります。尊敬の念を込めて、私はあなたに健康を願っています！
エリー・ハヴギマナ・ザ・ラバー。

Pro milito ĉi tie, la retkonekto ne stabilas. Mi bedaŭras! Preĝu por ni, orientanoj de la DR Kongo. Amike via Honoré

ここでの戦乱のため、インターネットがつながりにくくなっています。本当に残念です。民主コンゴ東部に住む住民のために祈ってください。セブホロ

Ĉeĥio チェコ

Saluton sinjoro Jasuo, dankon. Certe Esperanto pliriĉigas nian vivon, do necesas ĝin uzi enĉiutaga vivo. Kaj disvastigi plu laŭ ebleco.

En Praha teatro "Semafor" estis koncerto, dum kiu unu knabino kantis esperante. Ŝi diris, ke ŝia patro estis esperantisto. Estus bele, ke oni almenaŭ iom paroligus siajn infanojn.

En novembro Praga Esperanta Klubo festos jubileon, se ne aperos nova pandemio. Jam 14 landoj anoncis iun "simian" malsanon. Eble tio estas stultaĵo, sed ĉe mi aperis penso pri biologia atako. Olga

こんにちは泰雄さん、ありがとうございます。エスペラントは確かに私たちの生活をより豊かにするので、私たちは日常生活でそれを使用する必要があります。そして、可能な限り言葉を広めなくてはね。

プラハの劇場「セマフォー」では、エスペラントで一人の女の子が歌うコンサートがありました。彼女は父親がエスペランティストだと言ってました。自分の子供にちょっとでもエスペラントを離させるのはよいことです。

11月、新たなパンデミックが発生しない限り、プラハ・エスペラント・クラブはお祝いをします。すでに14カ国がいくつかの「サル痘」を発表しています。ばかげているかもしれませんが、私には、「生物学的攻撃」の考えが浮かびました。オルガ

2022.5. 30

Fari pacon kun la planedo
de Luca Mercalli

Milito detruas homojn, amatojn, socion, ni bone scias tion de jarmiloj. Sed milito detruas pli kaj pli ankaŭ la medion. Kun la pliiĝo de pafforto de konvenciaj eksplodiloj (kaj nuntempe ni esperas eskapi de nukleaj), ofte portataj de longdistancaj misiloj kaj kun enorma energikonsumo de tankoj kaj militaviado, ĉiu milita operacio de hodiaŭa ankaŭ reprezentas grandegan malŝparon de krudmaterialoj kaj fosilia energio. La detruo de la teritorio, de la konstruaĵoj kaj infrastrukturoj faras la ceteron: rubaĵoj, kiujn oni devos forĵeti, nova betono, ŝtalo kaj aliaj altvaloraj materialoj, kiujn oni devos produkti por la rekonstruado, novaj ellasoĵoj de forcej-efikaj gasoj.

Do, kiam la novaĵo pri la unuaj rusaj bombadoj de Ukrainio atingis min la 24an de februaro, miaj brakoj falis. Mi diris al mi: adiaŭ ekologia transiro. Ekde tiam, la informoj turniĝis ekskluzive al la konflikto por tute vuali la publikigon de la dua parto de la Sesa raporto IPCC pri la klimato, kiu okazis la 28-an de februaro kaj etis difinita de la sekretario de UN Antonio Guterres kiel "kompendio de homa sufero kaj superforta akuzo kontraŭ la neefikeco de gvidantoj en la batalo kontraŭ la klimataj ŝanĝiĝoj". La media krizo - kiu ĉiam estis subtaksita kaj konsiderata margena kompare kun aliaj supozitaj prioritatoj - estis tiel denove oferita kiel sensignifa fronte al defendproblemoj.

Kaj jen nova longdaŭra minaco: la pliiĝo de militaj elspezoj tra la mondo. Centoj da miliardoj da dolaroj kiuj estos deturnataj dum jaroj de la mediaj celoj tiel pene enirintaj en la politikajn tagordoĵojn. Multaj sciencaj esploroj, kiuj polariziĝos pri militsistemoj kaj ne pri la energia transiro. Eble nur la timo resti en malvarmo kaj en mallumo pro la neprozota rusa gaso al Eŭropo movos iom da investo al renovigeblaj energioj, sed se ili atingos iujn rezultojn, tio bedaŭrinde estos pro malĝusta kaŭzo, la nacia fermo de la energia aŭtarkio. kaj certe ne la tutmonda kundivido de scioj kaj rimedoj por solvi la median krizon.

Tamen ni profitu el tiu ĉi milit-rilata energikrizo por akceli la transiron al renovigeblaj fontoj: neniu povos preni de ni sunon, venton kaj akvon, je pli ni estos energie sendependaj, des pli ni estos liberaj, neelaĉetebaj kaj ekologie daŭrigeblaj. Antaŭeniru, do, la termika izolado de konstruaĵoj, antaŭen kun la fotovoltaikaj paneloj sur la tegmentoj, sed ankaŭ atentu novan energian sobrecon, kiu ĉesigu la malŝparon kaj la superfluan.

La granda usona ekologiisto Barry Commoner (1917 - 2012) skribis en sia " Paco kun la planedo ", publikigita en Italio en 1990 , ke " la postvivado dependas samgrade de la fino de la milito kontraŭ la naturo kaj la militoj, kiujn ni batalas inter ni. Por fari pacon kun la planedo, ni devas fari pacon inter ni mem, inter la popoloj, kiuj loĝas ĝin". Jaroj pasas, sed ni neniam lernas.

戦争は人々、愛する人、社会を破壊します、私たちは何千年の間これをよく知っています。しかし、戦争はますます環境を破壊しています長距離ミサイルによって運ばれる爆発物の増加する火力（そして今、私たちは核兵器が使われないことを願っていますが）により、戦車や軍用機の膨大なエネルギー消費を伴って、今日のすべての軍事作戦はまた、資源や化石燃料の膨大な浪費意味します。領土、建物、インフラの破壊は更に他のものをもたらします。つまり、廃棄しなければならないゴミ、再建のために生産される新しいコンクリート、鉄鋼、その他の貴重な材料、温室効果ガスの新しい放出などです。

それで、2月24日にウクライナの最初のロシアの爆撃のニュースが私に届いたとき、私はがっかりしました。私は自分自身に言いました：ああ、これで環境保護への動きは止まったと。それ以来、様々なニュースは戦争のみになり、2月28日に行われたIPCCの第6回気候報告書の第2部の発表は、全く注目されませんでした。このように、他の想定される優先事項と比較して常に過小評価され、どうでもよいように扱われてきた環境危機は、防衛問題に直面して再び取るに足らないものとして犠牲にされました。

そして、次が新たな長期的脅威です。つまり、世界中での軍事費の増大です。政治的議題にやっとなってきた環境目標に振り向けられるはずだった数千億ドルが軍事に使われてしまうのです。エネルギー転換ではなく、軍事システムに科学的研究が向けられてしまうのです。おそらく、供給されないかもしれないロシアのガスのために寒さと暗闇に放置されることへの恐れは、再生可能エネルギーへの投資を動かすでしょうが、それらが何らかの結果を達成した場合でも、それは残念ながら間違った原因、エネルギーの国家閉鎖のために達成できたということになります。そしてそれは環境危機を解決するための知識と資源の世界的な共有ではありません。

しかし、この戦争関連のエネルギー危機を利用して、再生可能エネルギー源への移行を加速させましょう。誰も私たちから太陽、風、水を奪うことはできません。私たちがエネルギー的に独立しているほど、私たちは自由になります。償還可能で環境的に持続可能になります。次に、建物の断熱を進め、屋根に太陽光発電パネルを設置しよう。また同時に無駄や過剰を防ぐようにしよう。

偉大なアメリカの生態学者バリー・コモナー（1917-2012）は、1990年にイタリアで出版された彼の「地球との共存」で、「生存は、自然との戦争の終結と私たちが戦っている戦争に等しく依存している。地球と共存するためには、私たちは自分たちの間で、そこに住む人々の間で、平和を作らなければなりません。」と書いています。それから何年も経ちましたが、私たちは何も学んできませんでした。